Al s-ro André CAUBEL, Olivet.

Hago, 23-IX-1961.

Estimatasamideano!

En januaro nunjara vi mendis, pere de s-ro Labit, kelkajn librojn, en la valoro de 52.36 Steloj, kaj vi antaŭpagis ĉi tiun sumon al li. Sed erare vi pagis ne 52.36 Stelojn, sed 52.36 Novajn Frankojn!! Car vi devis pagi en NF nur la sumon de 18.33, vi tro multe pagis je 34.03 NF.

Ni jam pli frue sendis al vi la librojn. Vian tropagon de ~~18~~ 34.03 NF = 97.23 Steloj ni gardas en via konto por via dispono. Vi povas fari novajn mendojn aŭ uzi la sumon por abono al La Praktiko k.t.p.

Kun koraj bondeziroj ni salutas vin

samideane kaj amike,

PS. Kune kun la libromendo vi pagis ankaŭ vian Praktiko-abonon por 1961: 9.-- NF. Tiun pagon ni danke notis kaj ni esperas, ke vi regule ricevis la numerojn de la gazeto.